

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo merkredon la 28-an de majo 2014 per Skype.

(Protokolo aprobota la 21-an de aŭgusto 2014.)

Partoprenis:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Anne Karin Bondhus en Bryne
Mario Machlik en Tromsø
Herman Ranæs en Trondheim

0. Tagordo

Aprobata.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 10-an de aprilo

Aprobata.

2. Ekonomio

La kasisto raportis pri la ekonomio: Skagen Vekst kr 45 100,- Skagen Høyrente kr 64 731,-
La ĵus starigita altintereza konto ne aperas en la ret-banko, pro tio ni devas plenigi kaj
subskribi novan formularon, kiun la kasisto sendos perpoŝte al la estraranoj.

3. Landa Kongreso 2015

Ni decidis la datojn de la Landa Kongreso. Ĝi okazos inter la 12-a kaj 14-a de junio 2015.
Herman Ranæs, kiu jam provizore rezervis BUL-hytta, demandos NJE, ĉu rezervi la
kabanon por ili dum la tagoj antaŭ la kongreso.

4. Seminario

La seminario okazos sabate la 1-an de novembro 2014 per Skajpo, laŭ la sama maniero kiel
la pasinta seminario en februaro 2013. La temo estos: Artefaritaj lingvoj. Anne Karin,
Amelie, Ulf, Herman kaj Mario pretas kunlabori prezentite po unu lingvon. Ni esperas pri
pli da kontribuoj kaj Anne Karin verkos artikolon pri tio por la venonta numero de
Norvega Esperantisto.

5. Jarraporto kaj jarkalkulo 2013

Ni tralegis la jarraporton kaj notis la punktojn, kiuj ankoraŭ mankas. Mario kaj Anne Karin
laboros plu pri tio.

Anne Karin jam komencis la laboron pri la jarkalkulo, kaj ŝi esperas baldaŭ fini ĝin.

6. Tombo de Haldor Midthus

Ulf ricevis retmesaĝon de la preĝeja kuratoro (kyrkjeverje), kiun li plusendis al la estraro la
12-an de majo, sed ni decidis prokrasti la traktadon de tiu ĉi punkto pro la foresto de Ulf.

7. Eventualaĵoj

A, Mario prezentis la planitan tekston por la memorŝtono en Narvik.

B, Cato Haugen sendis retmesaĝon al la estraro pri eventuala vendo de Esperantonia kaj aĉeto de alia, pli granda domo por la oficejo en Magnor. La estraro ne povas decidi pri tiom grava afero sen esti rajtigita pri tio de la Landa Kongreso. Jardar respondos al Cato retroŝte.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30 - 21:35

La venonta interkonsiliĝo okazos la 26-an de junio 2014 (prokrastita ĝis aŭgusto)

Raportis Mario Machlik.